

Komunikoj

JARO 36-a

JULIO - AŬGUSTO - SEPTEMBRO

N-ro 143
2011

“Amu vian Dion
per via tuta animo
kaj vian proksimulon
kiel vin mem.”

Jesuo

Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.

LORENZ, FEB KAJ LA KONGRESOJ



Roy MacCoy ankaŭ ricevas Almanakon.

Kiel ĉiujare okazas, la vigla teamo de Lorenz kaj FEB, laborante kune, aktive partoprenis Brazilan kaj Universalan Kongresojn de Esperanto. En San-paŭlo, krom la bele organizita budo, kies prezroj de niaj varoj estis tre allogaj, samideano José Passini prelegis pri “Reenkarniĝo laŭ Spiritisma Vidpunkto”. La ĉi-jara novaĵo kaj ni faros la samon en la proksimaj Kongresoj, unu el verkistoj de Almanako aŭtografis ĝin. Ĉi-



Lorenzanoj en San-Paŭlo.

foje, kiu partoprenis la Aŭtografan Momenton, speciale invitita, estis la veterano kaj nobla amiko Osvaldo Pires de Holanda; sed ankaŭ Passini aŭtografis alian libron de nia Eldonejo, verkita en la portugala lingvo, *O JOVEM ESPÍRITA QUER SABER*, kie estas speciala ĉapitro pri Esperanto; verdire, estas respondoj de Passini al diversaj duboj de la junuloj pri la Lingvo Internacia.

Koncerne la Universalan Kongreson, same kiel la pasintaj jaroj, ni partoprenis la Movadan Foiiron, kie multaj samideanoj, el diversaj landoj, ekspoziciis plurajn varojn kaj interesojn. Nia budo estis plenplena de libroj kaj informoj pri Spiritismo. Alia grava momento estis la prelego de Passini pri la sama temo de la BKE, kiam pli ol cent homoj ĝoje partoprenis la kunsidon kaj ĉiuj ricevis Almanakon Lorenz 2011.

Ĝis la proksimaj Kongresoj!



Osvaldo kaj Passini aŭtografas.



Passini prelegas en UKE.



Plenplena
ĉambro en Danio.



Robinson, la blakharulo, donacas
Almanakon 2011 al Renato.



KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF

Al Majnov, 11.XI.1889

Estimata amiko!

Vi jam kredeble ricevis el Varsovio leteron pri la sorto de la N^o 2 de la "Esperantisto", kiun la poŝto en la tuta paketo sendis al la S.-Peterburga cenzurejo? Ĉu vi ne scias kio fariĝis kun la paketo? Bedaŭrinde mi nun mem estas malproksime de la domo ĉar la manko de ĉiutaga pano devigis min forlasi Varsovion kaj serĉi alian lokon de loĝado. Mia nova adreso estas: gub. G. Ĥerson, ul. Hannibalovskaja, dom Tarle.

S-ro Schmidt alsendis al mi vian tradukon de la versaĵo de la Granda Princo; ĝi estos presita en la N^o 3 de la "Esperantisto".

(Sen subskribo)

Al kelkaj senkuraĝaj esperantistoj

Ne sen intereso por Vi eble estos la jena letero de unu el niaj amikoj: "En la komenco mi Vane penis trovi en nia urbo amikojn por nia afero; ĉie mi renkontis rifuzon, kaj post kelkaj malfeliĉaj provoj mi jam perdis la kuraĝon kaj ĉesis labori, konsolante min per la opinio, ke la mondo ne estas ankoraŭ matura por nia afero kaj ni devas atendi pli bonan tempon. Sed post kelka tempo mi faris ankoraŭ unu provon kaj ĝi prosperis al mi trovi unu amikon por nia afero. Kune kun tiu ĉi nova amiko mi nun iris al mia unua rifuzinto kaj ni komencis denove la parolon pri la lingvo Esperanto. Vidante nun ke mi jam ne estas la sola malsaĝulo en nia urbo, la dirata persono denove tralegis la broŝuron, pripensis ĝin pli serioze kaj fariĝis baldaŭ ankaŭ varma amiko de nia afero".

L.Z-f

Al Gurevitz, 24. XI.1890

Estimata Sinjoro D. Gureviĉ!


Mi ricevis vian vortareton "hebrea-internacian" kaj mi sendis al vi mian koran dankon.

Ĉu vi ne volas ŝanĝi kun mi kelkaj ekzemplerojn de via verketo por aliaj verkoj? Se vi konsentas, tiam mi petas vin, sendi al mi 10 ekzemplerojn de via verketo kaj skribi al mi kiajn verkojn de la egala kosto vi volos de mi ricevi por ili, kaj mi ilin tuj sendos al vi.

Kun estimo D-ro Esperanto.

SIMPLA ANIMO

Rogério Mota



Mia simpla animo
ĉe la brusto de Dio
sin nutras.

Li min flegas
ĉar Li min amas.

Lia zorgo min konsolas,
Lia varmosento min protektas.

Lia voĉo min trankviligas,
Lia brusto min starigas.

Mi estas filo de Dio.


Mi estas animo de Lia animo,
malfirma infano, sed feliĉa.

Kelkfoje mi ploras,
mi malpurigas min...

Li min purigas, min karesas
kaj min kisas.

Mi aŭdas Liajn lulajn kanzonojn
kaj mi ekdormas ĉe Liaj brakoj.

Tradukis esperanten Paulo Carvalho




**Vi aŭdis, ke estas dirite al la antikvuloj:
Ne mortigu, kaj kiu mortigos, tiu estos en
danĝero de juĝado.**

Jesuo

Konsentu rapide kun via kontraŭulo, dum vi estas kun li sur la vojo, por ke la kontraŭulo ne transdonu vin al la juĝisto, kaj la juĝisto al la subulo, kaj por ke vi ne estu ĵetita en malliberejon.


Jesuo



Jesuo, amata Majstro!

Jen ni, la lastaj disĉiploj, kiuj petas, ke Vi akceptu nin en via regno. Ni aŭdas Viajn instruojn, kaj ni volas ilin plenumi en la ĉiutaga vivo, sed ni estas malfortaj, ni ne sukcesas ilin praktiki. Ni estas kvazaŭ malgrandaj birdidoj, kiuj volas flugi alten al la bela ĉielo, sed al ni mankas forto. Varmigu nin sub Via protekto, kaj fortigu nin kun Via nutraĵo, por ke baldaŭ, tre baldaŭ, ni sukcesu elflugi al nia plej alta celo, kiel filoj de Dio, la Ĉiela Patro, kaj Viaj disĉipuloj. Ni kredas je Vi, ĉar Vi diris, ke ni faros ĉion, kion Vi faris, sed ni devas kreski spirite, plifortiĝi kaj forte voli sekvi Vin, praktikante Viajn instruojn. Helpu nin, mi petas!

Spirito: Esperantisto
Mediumo: Délio Pereira de Souza



“Infanoj en la Transmondo” estas la titolo de la senpaga libro de ĉi monato. Se niaj karaj ekster brazilaj samideanoj interesiĝos, petu kaj vi ĝin ricevos.

La mesaĝo de la eta Marko estis psikografita de Francisco Cândido Xavier la 12-an de Decembro 1975, dek monatojn post lia forpaso.

Marko Hideo Hayashi, 12-jara, kaj la gefratoj Johano Baptisto Hayashi, 11-jara, kaj Ŝejla Tiekō Hayashi, 7-jara, forpasis en la 9a de Februaro de la pasinta jaro, pro akcidento sur la ŝoseo Anhanguera, proksime al Perus, kie ili loĝis. Ili estis la solaj filoj de gesinjoroj Ukuru Hayashi kaj Elite Diogo de Oliveira Hayashi.

Per rapida pentro, ni situos vin, kara leganto, en la familia dramo envolvanta la gepatrojn kaj la tri gefilojn, de iom antaŭ la akcidento, kiu mortigis la infanojn, ĝis la ricevo de la mesaĝo de Marko, fare de Francisco Cândido Xavier.

Kial la forpaso de infanoj, vivoj detranĉitaj en plena florado?

Multaj problemoj rigardataj nur el la fizika flanko similas nesolveblajn enigmojn; tamen, rigardataj el la vidpunkto de senmorteco kaj iom-post-ioma progresado de la animo, oni povas konscie peti iajn spertojn aŭ al ili enkonduki *por propra bonfaro*.

Petoj: editora_lorenz@uol.com.br



LORENZ

SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

RUA FRANCISCO VALE, 57, ENGENHEIRO LEAL
RIO DE JANEIRO CEP 21370-171

Tel. (21) 2221-2269 <editora_lorenz@uol.com.br>

É com alegria que, num esforço de divulgação da Editora Lorenz, oferecemos aos distintos amigos, praticamente a preço de custo, o Almanako Lorenz 2011 (Lançamento) pelo valor de R\$ 8,00. Receba também, como cortesia, o Almanako Lorenz 2010. É preço para divulgar!



LORENZ

Contato:

Tel. (21) 2221-2269
 editora_lorenz@uol.com.br

RUSA JUNA ESPERANTISTO VIZITAS OKCIDANTAN REGIONON

Aleksander Osintsev, 25 jaraĝa, instruanto kaj tradukisto pri frendaj lingvoj en Rusio, partoprenis la Brazilan Kongreson de Esperanto en San-Paŭlo kaj tie konis du junulojn de la Grupo de Esperanto Pac-horo, Bruno kaj Diego, kaj tuj post la kongreso vojaĝis kune al Rio-de-Janeiro por koni la urbon mirindan. La plej grava momento de tiu vizito estis kiam la rusa amiko partoprenis junularan spiritistan eventon kaj li parolis al pli ol du cent junuloj, en Esperanto, kaj Bruno tradukis portugalen. Ĉiuj aplaŭdegis la rusan kamaradon kiam li diris: “Mi estas tie ĉi dank’ al la mirinda komunikilo, nia kara lingvo Esperanto”.



ĈU VI ANKORAŬ NE REALIĜIS POR 2011?!!!

Se vi ankoraŭ ne realiĝis, ne forgesu ke via jara kontribuo treege helpas nin eldoni spiritismajn verkojn en Esperanto kaj ilin sendi, tute senpage, al niaj eksterlandaj samideanoj. Kaj vi, kara amiko, kiu neniam aliĝis, petu informojn kaj kun plezuro ni vin sciigos pri la laboro de nia Eldonejo kaj kion vi, kiel ano, ricevos en la konforto de via hejmo.

Dio benu vin!

editora_lorenz@uol.com.br
 Tel. (21) 2221-2269

Vi aŭdis, ke estas dirite:
Okulon pro okulo, kaj denton pro dento; sed mi diras al vi: Ne rezistu al malbono; sed al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian.

Jesuo